



La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.orgEsperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS**Informatie in het Nederlands****Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.orgP.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN**Informationen auf deutsch****Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.orgK. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH**Aperas kvarfoje en jaro kaj
rete elŝuteblas ĉe
www.senlime.org****Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere antaŭ la
jarfino, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La jara kotizo al *Senlime* (10 €)
estas disigita de la abono al la
papera versio de nia informilo (12€).**ENHAVO :****p. 1 : Esperanto en Marche****p. 2 : Niaj programeroj lupee****p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2012-2013 (1/2)****p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo****p. 5 : Promenado Tongeren-Beukenberg****p. 6 : Verviersa angulo : *La Langue universelle*****«Esperanto en Marche»,
votre Revue de l'Association Pour l'Esperanto
... ne «marche» plus (pour l'instant ?).**Rappelons que l'«Esperanto en Marche» n'est pas édité par *Senlime*
ni par le groupe espérantiste de Verviers. Toutefois, nous
collaborions à cette revue qui reproduisait les 6 pages de «*La Voix
d'Amikejo*». Nous sommes désolés de voir ce service interrompu et
espérons qu'il pourra bientôt reprendre.Entretemps nos pages restent librement téléchargeables (et
reproductibles) sur notre site internet à l'adresse suivante :
<http://www.senlime.org/Info/Lasta.zip>**«Esperanto en Marche»,
via Informilo de la Belga Asocio Por Esperanto
... (provizore ?) ne plu «marŝas».**Ni memorigu ke la informilo «Esperanto en Marche» estas eldonita
nek de *Senlime* nek de la esperantista grupo de Verviers. Tamen, ni
kunlaboris kun tiu revuo kiu reproduktis la 6 paĝojn de «*La Voĉo de
Amikejo*». Ni afliktiĝis vidante tiun servon interrompitan kaj esperas
ke ĝi baldaŭ refunkcios.Intertempe niaj paĝoj restas libere elŝuteblaj (kaj reprodukteblaj) el
nia retejo je la jena adreso :<http://www.senlime.org/Info/Lasta.zip>



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncĵaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Karaoke de Senlime

Ja estas nun konate ke **Senlime** regule organizas sian propran karaokeo-n en Kelmis, fine de junio, agrabla maniero ĝisrevidi fine de la lerneja jaro. Kelkajn himnojn ni ankaŭ kelkfoje kantas okaze de festoj kiel la Zamenhofa en decembro, k.t.p.

Karaoke kompreneble ne havas nur ludan celon, ĝi ankaŭ havas grandan kulturan valoron, se oni konsideras ke ĝi permesas konatigi eksterlandajn kantojn (kaj tiele kulturon) enlande... kaj inverse.

Sed eĉ plie ni povas konatigi la esperantistan kulturon kaj lingvon al neesperantistoj. Tiel karaokeo fariĝas lingvo-instruilo.

Post plurjara sperto, Jean-Marie **Jacques** prezentis al ni en DVD kelkajn ekzemplajn karaokeojn de **Senlime** : temas nur pri kantoj el la «publika bieno», kio signifas ke ili estas libere uzablaj sen aŭtoraj rajtoj.

Se vi aliĝis/os al la yahoo-grupo «Amikejo» vi eĉ povas senpage elŝuti el ties dosiero «Fichiers» kelkajn el tiuj «karaokeoj de Senlime» kaj rekte uzi ilin per via komputilo.

Venu kanti (kaj ridi) kun ni : kiel kutime rajtos laŭplaĉe elekti kelkajn kantojn el nia ĉiam pli kaj pli vasta kolekto.

06-18 20h00 BE-Kelmis, Select: karaokeo de **Senlime**.

Inf. lousberg@senlime.org

Promenadoj

Senlime celas (re)enkonduki esperanton en la regiono de Kelmis/Amikejo. Tiucele, ni publikigos kelkajn promenad-cirkvitojn, kiujn ni grupe «provos» dum la ferioj (espereble ĉe bela vetero).

La iamaj Kelmis-aj zink-ĉerpejoj, riĉaj je pezaj metaloj, influis la lokan kreskaĵaron. Kelkloke, nur plantoj rezistemaj aŭ toleremaj pri pezaj metaloj pluvis. La plej konata certe estas la kalamina penso (Viola calaminaria). La herbeca kaj arbeca tavoloj ankaŭ prezentas grandan specian diversecon.

La faŭno trovas en tiu medio multajn disvolviĝajn eblecojn. La galeriaj enirejoj estas taŭg-aranĝitaj por faciligi la envenon de vesperoj.

Por ebligi al la vizitanto plene ĝui pri tiu natura juvelo, pado da 4,5 km estas signalizita per verda kruco (ne stelo !) sur blanka fono.

Krom tio kaj la nemalfarenda promenado de Kelmis al la trilanda punkto (tra la Preuss-arbaro, longe de iamaj limŝtonoj) sen forgesi la viziton de la iamaj domoj de Amikejo, en la nuna Kelmiso, restas kelkaj aliaj vidindaĵoj, kiel ekzemple la spuroj de la tramlinio Akeno-Amikejo...

Ĉiun 3an vendredon de julio kaj aŭgusto 15h00 BE-Kelmis (foriro de la Select): esperantista promenado en Amikeja regiono.

Inf. jacques@senlime.org

Ĝenerala asembleo

Vi estas invitataj ĉeesti la ĝeneralan asembleon de **Senlime** kaj E.G.V, okazonta en B-Kelmis (Select, Lutticherstr. 264), la 21an de septembro, de la 20a ĝis la 22a horo, kun jena tagordo :

- oficialigo de la membro-listo
- starigo de la ĉeestantara listo
- kontrolo de la mandatoj
- raporto de la ĝenerala sekretario
- raporto de la kasisto
- jura aprobo de la komitato
- estonta agado de Senlime/EGV
- (re)elekto de la komitatoj
- diversajoj

Ni rememorigas al vi ke nur kotizinta membro rajtas voĉdoni kaj kandidatiĝi kiel komitatano.

Membro kotizinta kaj malhelpata ĉeesti rajtas doni skribitan mandaton al alia persono.

Ĉia temo povos estis pritraktita fine de la asembleo, post aŭ kadre de la «diversajoj» sed la ĝenerala sekretario rajtas mallongigi la debatojn pro manko da tempo.

Bonvenon al ĉiuj !

La registro enhavanta la oficialajn dokumentojn de **Senlime** kaj E.G.V. estos konsultebla de la (kotizintaj) membroj en la sidejo de la asocio **Senlime**, str. J. Wauters 5, BE-4800 VERVIERS

09-21 20h00 BE-Kelmis, Select: **Ĝeneralaj asembleoj de Senlime kaj E.G.V.**

Inf. jacques@senlime.org

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2012-2013 (1/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutlicherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org).

07-20 15h00 BE-Kelmis,
Select: **Amikeja promonado**,
gvide de loka esperantisto.
Inf. jacques@senlime.org

08-17 15h00 BE-Kelmis,
Select: **Amikeja promonado**,
gvide de loka esperantisto.
Inf. jacques@senlime.org

09-21 20h00 BE-Kelmis,
Select: **Ĝeneralaj asembleoj de Senlime kaj E.G.V.**
Inf. jacques@senlime.org

10-19 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Vojaĝo en Mongolio",
prelego de Marcel **Delforge**.
Inf. delforge@senlime.org

11-16 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Esperanto-vortaro-programo",
prelego de Bernd-Rainer **Lauber**.
Inf. lauber@senlime.org

12-16 10h00 BE-Verviers,
Zamenhof-festo de **Senlime**.
Inf. jacques@senlime.org



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, la: **12-21, 01-18, 02-15, 03-15, 04-19, 05-17 kaj 06-21.**

20-07 15h00 BE-Kelmis,
Select: promenade en Amikejo,
guidée en espéranto.
Inf. jacques@senlime.org

17-08 15h00 BE-Kelmis,
Select: promenade en Amikejo,
guidée en espéranto.
Inf. jacques@senlime.org

21-09 20h00 BE-Kelmis,
Select: **Assemblée générale de Senlime et E.G.V.**
Inf. jacques@senlime.org

19-10 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Voyage en Mongolie",
conférence de M. **Delforge**.
Inf. delforge@senlime.org

16-11 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Logiciel-dictionnaire-espéranto",
conférence de Bernd-Rainer **Lauber**.
Inf. lauber@senlime.org

16-12 10h00 BE-Verviers, Fête
Zamenhof de **Senlime**.
Inf. jacques@senlime.org



Autres réunions au Select à BE-Kelmis, les: **21-12, 18-01, 15-02, 15-03, 19-04, 17-05 et 21-06.**

Novajoj pri **KELMIS** .

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

14an de Oktobro 2012 : balotado en Belgio

En Kelmis, post la voĉdonoj en 2006, la soci-demokratoj decidis sole estri la komunumon.



Mathieu Grosch denove iĝis urbestro.

Hodiaŭ, iuj parolas pri antaŭ-voĉdonaj interkonsentoj inter socialistoj kaj soci-kristanaj. Sed laŭdire buŝa akordiĝo inter tiuj du partioj jam estis rompita post la antaŭa balotado. Kio okazos ĉi-foje ?

Teknike, de 1994 iuj balotaj kantonoj jam adoptis elektronikan voĉdon-sistemon. Temas pri voĉdono organizita pere de magneta karto sur kiu la elektoj de la voĉdonanto, pere de optika krajono kaj de komputilo surekrane proponinta la eblajn elektojn, estas memorigitaj.

La voĉnombrado ankaŭ estas aŭtomate farita de komputiloj.

En 2012, 39 pliaj komunumoj adoptos la aŭtomatan balotadon, inter kiuj Kelmiso.

Eksterlandanoj (eŭropanoj aŭ ne) instalitaj en Belgio rajtas voĉdoni por komunumaj reprezentantoj (sed jam ne provincaj, laŭ la nuna leĝo). Oni konsideras ke 260000 nebelgoj (eŭropanoj aŭ ne) loĝantaj en Valonujo teorie povos voĉdoni.

La muzeo pri la «Gueule»

Strato Max 9-11
BE-4720 KELMIS
Tel +32 (0) 87 - 657504



Tiu muzeo, kiu jam de pli ol dek jaroj atendas «tujan» renovigon, subtile prezentas la politikajn kaj historiajn strangaĵojn de la «Neŭtrala teritorio de Moresnet», la historion de la zink-industrio kaj de la entrepreno «Vieille Montagne» [Malnova Monto], kune kun riĉan kolekton da ercoj el la regiono. Fotoj montras maloftan floraron, tipan ĉe grundo riĉa je zinko.

La utopia transformiĝo de la neŭtrala teritorio en «Esperantan ŝtaton», kaj la regiona folkloro ankaŭ estas tie prezentitaj. La kolektantoj povos admiri poŝtmarkojn kaj monerojn el la neŭtrala teritorio Moresneta, kiuj apenaŭ dum 17 tagoj validis.

Krome, la Muzeo pri la valo de la rivero «Gueule» gastigas le turismoficejon de la komunumo Kelmis [La Calamine].

Portempaj ekspozicioj ankaŭ tie okazas dum la tuta jaro : ĝis la 26a de aŭgusto, «Vojaĝo al la bluo : H. Matisse – G. Braque».

Malfermas :

Ma. kaj ve. 8h-12h
Me. 8h-12h + 14h-16h30
Sa. kaj di. 14h-18h.

Euregio TV

Sep regionaj televidaj kanaloj el Eŭregiono Mozo-Rejno kreas novan televidan elsendon kiu ebligas al la 5 milionoj da tieaj enloĝantoj malkovri eŭregionajn temojn. La elsendoj de "Euregio TV" komenciĝos la 15an de septembro.

"Oni rimarkas peton de la enloĝantoj esti pli bone informitaj pri tio, kio okazas en Eŭregiono", klarigas Dirk Vandriessche, prezidanto de la BRF (Belgia radio kaj televido germanlingva). "Tamen nune ekzistas nenia televido kiu tute pritraktas tiun regionon. Ni ankaŭ konstatas ke societoj tre interesiĝas pri la fakto komuniki siajn agadojn en la tuta regiono."



RTC Tele Liege, Televesdre (Verviers), BRF (Eupen), TV Limburg Belgie (Hasselt), TV Limburg Nederland (Roermond), Center TV Aachen kaj Center TV Köln do volas krei, interne de la Eŭregiono, elsendrimedaron por televido analogia kaj digitala. Ili interŝanĝos bildojn kaj produktos ĉiumonatan elsendon enhavantan raportaĵojn, longaj je 3 ĝis 5 minutoj, el ĉiu kovrita regiono, kiuj estos tradukitaj kaj surtekstigitaj.

Euregiono Mozo-Rejno subtenas la projekton per 50.000 euroj. Eble nova ŝanco ankaŭ por **Senlime**...

Promenado Tongeren-Beukenberg

1. La statuo de Ambioriks

Dum la vintro 54/53 a. J-K., armea legio de Julio Cezaro restadis en la lando de la Eburonoj en loko nomita Atuatuca. La eburona reĝo Ambioriks estis sukcesinta eliri tiujn trupojn el ilia loĝejo kaj supervenki ilin en apuda valo. Tio estis la plej granda malvenko de Cezaro dum la Gaŭlia konkero. Ĉiuj konas liajn famajn vortojn «Horum omnium fortissimi sunt Belgae» [el ĉiuj gaŭliaj popoloj, la belgoj estas la plej bravaj]. Tamen li ne hezitis, por sin venĝi, dufoje klopodi elpeli la eburonojn kaj ilin buĉi. Li tamen neniam sukcesis kaptigi Ambiorikson mem.

En 1866, statuo de la reĝo de la Eburonoj estas starigita sur la ĉefa placo en Tongereno. Tiuepoke, la juna Belgio serĉis por si naciajn heroojn. Ambiorikso, grava figuro inter la "iamaj Belgoj", ŝajnis ideala por eksciti la naciecan konscion. Ambioriks ricevis tiun honoran lokon dank'al la tiama koncepto laŭ kiu Tongeren estis la loko de la batalo... sed oni nur scias ke ĝi okazis en valo apuda al Atuatuca (Bassenge), kie dumvintre loĝis la romia armeo...

2. La Templo (Keverstr.)

Nordlime de la urbo, fine de la 1a jarcento kaj komence de la 2a jarcento, estis konstruata, sur artefarita teraso, ŝtona templo. La okcidenta muro de la teraso nun estas parte konservita. Kulta konstruaĵo verŝajne jam samloke staris dum la 1a jarcento. La mapo de la unua konstruo montras miksaĵon inter gaŭliaj kaj klasikaj romiaj proprecoj. La templo konsistis el kerno pli-malpli kvadrata, la «cella», kun pordego kaj ŝtuparo antaŭe (ĝian bazon oni nun plu vidas en lerneja tereno). Ĝi staris centre de rektangula sanktejo bordita de kolona galerio. Norde troviĝis diversaj servenirejoj.

Ne hazarde templo troviĝis tiuloke. Unue, ĝi staris sur la plej alta punkto de la urbo. Due, tuj apude estis la urbaj akvo-fontoj.

Niaj praŭloj opiniis ke tiaj lokoj estas bonegaj por kontakti, per la kultaj agoj, la dioj de la supraj kaj malsupraj mondoj.

Ni ne havas informojn pri la ĉi-tie respektigitaj dioj. En la templa tereno, oni trovis rompitaĵajn fragmentojn de religiaj skulptaĵoj, interalie bildo de Merkuro kaj kolono de Jupitero je Gigantoj, skulptaĵo sur soklo supre de alta kolono, sur kies facoj estas reprezentitaj dioj. Oni distingas rajdanton, tenanta per sia levita mano metalajn fulmojn, karakterizanta la plej altan romian dion (do Jupitero). Pri la signifo de tia monumento arkeologistoj plu diskutas : ĉu klasika mita rakonto aŭ ĉu simbolo de la romia imperiestro kiu subpremas ĉian eblan ribelon ?

3. La romia muro el la 2a jarcento

Dum la 2a jarcento, giganta romia muro longa je pli 4,5 km estas konstruita ĉirkaŭ Atuatuca-Tongereno. La restoj de tiu muro (Cesarlaan) estas ĝis hodiaŭ konservitaj laŭlonge de 1,5 km. La muro estis ĉirkaŭ 2 m. dika kaj verŝajne alta je 6 m (la plej bone konservitaj partoj nun altas je 4 m). 2 aŭ 3 ĉirkaŭosaĵoj larĝaj je pli ol 10 m kaj profundaj je 5 m estas taŭgaranĝitaj. La kerno de la muro konsistis el silikaj blokoj kaj ŝtonetaroj ligitaj per mortero da flava kalko. Belaj silikaj blokoj kvadrata tranĉitaj estis poste surgluitaj. Nur sude de la urbo, en marĉa regiono, sur distanco da 800 m, oni unue plantis kverkajn palisojn.

Vico da turoj kaj enirpordoj estis konstruitaj. La plej monumentaj troviĝis sur la vojoj de Cassel, Bavay et Kolonjo. Dum la mezepoko, la romia muro el la 2a jarcento estis la plej grava ŝtonminejo en la regiono : ĉiuj postaj konstruaĵoj estos faritaj almenaŭ parte per ŝtonoj ĉerpitaj el tiu muro.

4. Kastelo Betho kaj Plinia fonto

La kastelo Betho datiĝas el 1478 kaj estas konstruita laŭ la Mozlanda stilo.

Aliflanke de la vojo al Hasselt, dum la romia epoko, laŭ Plinio, troviĝis fonto laŭdita pro ĝiaj kuracaj ebloj. En 1787, la fonto estas gastigita en ĝardendomo. En 2008 malfermiĝis tie romi-tema alloga parko (en la stilo de Walibi), kiu tuj bankrotis. Poste eblis senpage viziti ĝian romian dekoron. Oni nun kreas tie promenad-centron.

5. La Beukenberg

La Beukenberg (fagomonteto) estas taluso el densa argila tero formanta artefaritan monteton kiun oni povas sekvi laŭ proksimume 5 km en la pejzaĝo. Ĝi estas konstruita fine de la 1a jarcento aŭ komence de la 2a kaj utilis kiel akvodukto al la romia urbo. Laŭlonge de tiu-ĉi, la akvo verŝajne estis transportita ene de ligna kanalo. Ek de la loko, kie la akvo-kondukilo atingas la urban muron, la verko estas ligita al ŝtona konstruaĵo kondukanta al kovrita distribua baseno. De tie la akvo provizis per etaj kanaloj diversajn basenojn disigitajn en la urbo.

La akvodukto ne estis la sola akvodistribuiĵo pri kiu la enloĝantoj de la urbo povis kalkuli : oni diversloke trovis romiajn akvoputojn kaj en la malalta parto de la urbo oni povis uzi la akvon de la rivero Jeker.

6. La kaŝitaj trezoroj de la Sint-Truidersraat

- **Itinerarium** : romia kilometroŝtono. Sur la 3 facoj estas skribitaj la nomoj de romiaj urboj. La distancoj estas mezuritaj en «Leugae» : iama linia mezurunuo egala al proksimume 2200 m.

- **Dekduedro** (pligrandigita) : oni ne konas la funkcion de tiu objekto. Eĉ nun, ĝi plu intrigas la fakulojn per siaj 12 facoj kvinangulaj kaj siaj malgrandaj buloj lokigitaj je ĉiu vertico.

- **Monero** de Aŭgusto (pligrandigita) : ĝi portas sur unu faco la portreton de la imperiestro kaj la sigelon de la urbo Tongeren sur la alia.

Verviersa **A**ngulo

Verviersa **E**speranto **G**ruppo

"The Universal language"

1887-2012 : la langue universelle a 125 ans !

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour
l'Espéranto (A.P.E.)
Jean-Pol Sparenberg
20 Ruelle de Thuin
6540 LOBBES
Tél. 071/59.15.42

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants
sont cordialement invités à soutenir
notre programme d'action en versant
chaque année une ou plusieurs des
cotisations suivantes au compte

979-5327148-10

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.

La cotisation de **Senlime** est
obligatoire et fixée à 10 EUR. Ce
bulletin d'information est intégré à la
revue «Espéranto en marche»,
comprise dans la cotisation à APE.

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 2012 (EGV) 25 €

U.E.A. 2012 (MA-T) 61 €

Senlime (cotisation 2012) **10 €**

Indiquez les nom, prénoms et
domicile du membre cotisant ainsi
que l'association bénéficiaire:

«cotisation de.... pour....».

125 ans après la publication du
"**premier livre**" de **Zamenhof**,
en russe, vient de paraître, en
anglais, sur DVD en HD, un
documentaire professionnel sur
l'espéranto, langue universelle.

Sam **Green** est un documen-
tariste réputé. Il a été nommé en
2004 aux Oscars pour son
documentaire **The Weather
Underground**. En 2011, pour
réaliser un ensemble de quatre
documentaires, il part à la
recherche des "utopies" qui
permettent de mettre fin aux
guerres et aux conflits culturels.
Il rencontre tout naturellement
l'espéranto et les espéranto-
phones pour couvrir le premier
opus de cette série.

Il a interviewé plusieurs
espérantophones à travers le
monde et dépeint une vision très
hétérogène de notre monde de
l'espéranto. On découvrira à
travers les portraits que chaque
espérantophone a suivi un
parcours différent qui l'amène à
une meilleure connaissance des
autres cultures et de soi-même.

Le film **The Universal
language** [la langue universelle]
est non seulement un
documentaire qui permet de
découvrir des facettes inconnues
de l'espéranto, mais surtout un
excellent cadeau à faire à son
entourage pour faire connaître
l'espéranto. Quand on dit qu'une
image vaut mille mots, vous
imaginez l'impact que peut avoir
une suite animée d'images
pendant la demi-heure que dure
cette vidéo.

Dans ce documentaire pionnier
sur la langue, **Green** entremêle
des entretiens et des portraits
qu'il a filmés lors de plusieurs
congrès mondiaux avec un
trésor d'images d'archives
inédites sur **Zamenhof** et le
mouvement durant la première
époque de l'espéranto.

Un épisode peu connu de
l'histoire de l'espéranto nous y
est présenté : la construction et
l'inauguration d'un «monument
de l'espéranto», sur l'île de
Texel (NL), où la langue était
incroyablement populaire au
début du 20^e siècle (près de
2.000 des 8000 habitants étaient
espérantistes), grâce à Gijs et
Johan **Duinke**, deux frères qui
possédaient le journal local
(**Texelse krant**) et étaient
devenus espérantistes lors d'un
voyage à travers l'Europe. On
peut voir leur petit film sur
http://www.youtube.com/watch?feature=player_detailpage&v=7RxxRVZ9F8o

Prof. de littérature anglaise à
l'Université de Princeton, Esther
Schor dit du film : "*Si le
test d'une langue universelle est
de savoir s'il nous parle à tous,
alors la langue universelle passe
le test avec brio.*"

The Universal language de
Sam **Green**, DVD de 28 minutes
en HD, sous-titré en 19 langues
(y compris le français,
l'allemand, le néerlandais et
l'espéranto), est disponible chez
Espéranto-France, 4bis, rue de
la Cerisaie, F-75004 Paris
(butiko@esperanto-france.org).
Prix : 18 euros + frais d'envoi.